# *Monda Semajno de Akvo*




De la 25-a al 29a de a?gusto  oni celebras la mondan semajnon de akvo. Kiam oni ekkomencis celebris ?in por la unua fojo?

En julio 2010 la ?enerala asembleo de UN rekonis la rajton de ?iuj homoj al akvo kaj purigaj servoj. Tio signifas ke ?iu persono devus havi aliron al sufi?a akvo por endoma uzo: inter 50 kaj 100 litroj da akvo ?iutage,

Kaj ?i devus esti sekura, akceptebla kaj alirebla. ?ia kosto ne devus esti pli 0l 3% de la domaj enspezoj. Kaj la fonto ne devus esti pli fora ol unu km de la domo, nek ?i kolekto devus superi 30 minutojn.

UN delonge laboras pri akvoproblemo tutmonde,  ekde 1977 en diversaj kunvenoj kie oni interkonsentis amason da decidoj, kiuj supozeble devintus kontribui al plibonigo de la monda akvokrizo.

?iujare oni celebras du internaciajn tagojn de UN pri akvo kaj purigado.

La UN-oficejo pri nutrado kaj monda organizo pri sano, 2,1 bilionoj da personoj malhavas aliron al trinkebla akvo en sekura mastrumado, 4,5 bilionoj da homoj posedas sekurajn sanigajn servojn, 340 mil infanoj malpli ol 5-jaraj forpasas ?iujare pro malsanoj diareaj kaj almena? 1 800 milionoj da homoj tutmonde trinkas akvon ne protektitan kontra? feko-poluado.

Tial, ?i tiu monda semajno de akvo estas strategia punkto por la akvoproblemoj tutmonde. Per ?i oni celas cerbumi pri la problemoj de akvomankoj, ?ar ?i estas esenca por la vivo.

Kaj influas gravajn aspektojn por la homaro, interalie, la produktadon de nutra?oj, energion, klimatan ?an?i?on, edukadon kaj sanon. Sen ?i, la vivo ne estas garantiata, kaj la alvoko estas  ?in protekti kaj uzi racie.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/ciencias/363350-monda-semajno-de-akvo

Radio Habana Cuba